



Abonu Pilo-Press

PILO-PRESS Jara abonkotizo

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

Internacia

30,-- GM

Informservo

N-ro 10/78 - 8 mar 1978
Aperas ĉiusemajne

Por muzikdiskoj, sondokumentoj kaj filmoj

Bruselo (pp) - S-ro Renaud de Saint Moulin de Esperantista Brusela Grupo informas:

En la Belgia Radio, mi redaktis kaj prezentis ok dekminutajn elsendojn, nunsonbendigitajn, kies radio-disvastigo okazos ĉiujn sabatojn je la 18-a horo dum marto kaj aprilo. "Vojaĝo tra l' mondo per la esperantlingva muzikdisko" estos aŭdebla ankaŭ ĉirkaŭ Belgio.

En la elsendo, du-minutaj paroladoj pri diversaj aspektoj de la monda lingvoproblemo kaj pri Esperanto kaj ĝiaj realigoj sekvas bonkvalitajn esperantlingvajn muzikdiskojn (oliver Tzaut, Margaret Hill, Brazilo kantas, Litovaj kantoj, Sirkka Lehtivaara, Bulgaraj kantoj, Japanaj popolkantoj, Marguerite Sautreuil). Mi ankaŭ uzis kelkajn sondokumentojn: Festparolado kaj Salutparoladoj en la inaŭguro de la 49-a UK, voĉo de Julio Baghy por enkonduki la esperantan literaturon.

Mi skribis al la Magnetofona Servo de UEA por ricevi aŭ aĉeti vivajn sondokumentojn, sed mi ricevis neniam respondon: ŝajnas ke la poŝto malfunkciis. Tamen mi kredas ke devus ekzisti modela sonbendo (je la profesia rapideco 19) kun diversaj sondokumentoj por ke informistoj povu rapide, facile kaj vive ilustru radiajn elsendojn.

UEA kaj la landaj asocioj devus okazigi la produktadon de muzikdiskoj (ekzemple gajaj tipoj kantoj): Tio alportos monon al la movado, kaj estas rimedo - aŭ efika preteksto - por paroli pri la internacia lingvo. En la Belga Radio, se mi havus pli da diversaj muzikdiskoj kun bonega akompanado, mi plilonge povus paroli pri Esperanto.

La esperantistoj ne sufiĉe spertas originalajn kaj nuntempajn amasrimendojn por la informado. La ĵurnaloj ŝatas muzikdiskojn: ni donu al ili muzikdiskojn. Multaj personoj aŭskultas kasedojn: ni faru kasedojn kun esperantlingvaj kantoj kaj kun nacilingvaj informoj, kiujn oni povas aŭskulti kiam oni lavas la teleraron aŭ kondukas aŭtomobilon. (Malmultekosta kasedo kostas proksimume 35 bf, 4 ff, 2,5 gld. aŭ 1 dolaron).

La personoj nun multlonge rigardas televidilon: ni uzu la sistemon "Video" por fari televidofilmojn, ĉar ekzemple ekzistas en Belgio specialaj elsendoj pri tiuj filmdokumento. Dum ekspozicioj, la personoj ne ĉiam legas la informilojn distribuitajn, kaj dum prelegoj nur parolado estas laciga kaj senviva: La filmsistemo "Super 8", nun tre efika kaj malmultekosta, permesas tre belajn filmojn kun sono. En la komencoj la movado ne devos aĉeti tiun "Super 8"-an materialon, ĉar ekzistas en diversaj landoj sen-profitaj asocioj kiuj disponebligas ĝin kaj eŝ teamon.

Oni kredas kion oni vidas: per novaj metodoj ni montru!

Adreso de la skribinto: Renaud G. de Saint Moulin, 7 ave Henri Dietrich, B-1200 Bruselo, Belgio.

Aŭskultu la Esperanto-elsendojn - skribu al la redakcioj!

Legu Esperanto-revuojn - abonu ilin!

Legu Esperanto-literaturon - aĉetu librojn!

"Iu" lingvo en Radio Luksemburgo

Luksemburgo (pp) - En la ŝatata elsendo de Radio Luksemburgo

"12 Uhr mittags" (= je la tagmezo)

la 3-an de marto 1978 oni faris ludon resp. oni intervjuis pastron Kindler (Triksini), sed ne diris, kion li faras en Luksemburgo, krome ke li estas pastro, magiisto kaj pluĵudisto.

Li demandis en "iu" lingvo: "En kiu lando okazos ĉi-jare la monda futbaltturniro?". La aŭskultantoj de RTL devas sendi nun poŝtkarton, sur kiu staras la respondo al la demando kaj la rimarko pri kiu lingvo temas.

La adreso estas: "12 Uhr mittags" Radio Luxemburg, Stichwort "Sprache", Luxemburg.

Post la demando oni aŭdigis kanton de Olivier Tzaut en tiu lingvo, por plifaciligu la aferon.

Estas testo: kiom da personoj ekkonis la lingvon, kaj ĉu ankaŭ estontece multe da personoj volos aŭdi ion pri kaj en tiu lingvo.

Pri la elsendoj de Portugala Radio

Lisboa (pp) - Pri la elsendoj de Portugala Radio ŝajnas regi kelka konfuzo. Kelkaj fontoj parolis pri ĉiutagaj elsendoj kaj ankaŭ Pilo-Press kredis tion. Sed nun ni eksciis, ke la Portugala Radio elsendas dutage en la semajno.

Laŭ informoj de d-ro J. Kondor la Portugala Radio elsendas jene:

Dimanĉe

Ondoj 49,79 m, 30,80 m (aŭdebla en Eŭropo)

Tempo de Greenwich:	18,20 - 18,30 horo	21,50 - 22,00 horo
	20,50 - 21,00 horo	22,20 - 22,30 horo
	21,20 - 21,30 horo	

Do oni elsendas kvinfoje en la dimanĉa vespero!

Lunde

Ondoj 31,13 m, 25,42 m (aŭdebla en Suda Ameriko)

Tempo de Greenwich:	01,20 - 01,30 horo
	02,50 - 03,00 horo

Ĉiujn informojn pri la aŭdebleco kaj pri la enhavo de la elsendoj oni direktu al:

Radio Difusao Portuguesa, Internacia Fako Esperanto, R. do Quelhas, Lisboa 1, Portugalio.

Internaciaj Floraj Ludoj

Barcelona (pp) - Dezirante reokazigi la glorajn Internaciajn Florajn Ludojn, kiuĵ tiel solene okazadis 17-foje en diversaj urboj de Katalunujo, la Kataluna Kunordiga Komitato de la Hispana Esperanto-Federacio invitas, post 42-jara ĉeso, la esperantistajn poetojn kaj prozistojn ĉiulandajn konkuri noble per siaj verkoj en tiu tradicia Beletra Festo kiu, en la trobodora epoko, estiĝis en Tuluzo (Okcitanujo) kaj poste firme enradikiĝis en Katalunujo, kie ankoraŭ nun ĝi vigle persistas, kaj kie unuafoje ĝi eniris en la Esperantan Movadon kiel brila programero de la 5-a Universala Kongreso de Esperanto en Barcelona.

Estos aljuĝitaj premioj en la poezia, proza kaj traduka branĉoj.

Detalajn informojn donas: S-ro Salvador Aragay, str. Bassegoda 40,3-1 Barcelona 28, Hispanujo.

Denove pri RTI

Legu denove la artikolon sur paĝo 2: "Tu" lingvo en Radio Luksemburgo kaj poste:

Bonvolu respondi (kaj danki) amase! Ne skribu longajn leterojn! Estus granda helpo por la Esperanto-Centro Luksemburgo kaj ties propagando en radio kaj televido.

Jen denove la adreso: "12 Uhr mittags" Radio Luxemburg, Stichwort "Sprache", Luxemburg.

Eta sarlanda dialektologio

Saarbrücken (pp) - Aperas la dulingva eldono de:

Ludwig Harig, Die Harmonie der Widersprüche, Eine kleine saarländische Sprachkunde - La harmonio de la kontraŭdiroj, Eta sarlanda dialektologio, Prezo 6,-- GM.

La titolo devenas el la libro "La Sarlanda Ĝojo" de Harig, el 1977. La Esperanto-tradukon kaj la prefacon por ĉi eldono prizorgis Reinhard Hauptenthal, instrukomisiito por esperantologio en la Universitato de Sarlando. La sarlanda Ministro por Kulturo, Klerigo kaj Sporto konsentis subvencii la eldonon. Tiele unuafoje sarlanda aŭtoro prezentiĝos per la Internacia Lingvo al internacia publiko.

Kiel ni ekscias, la Sarlanda Radio kaj Televido interesiĝas pri la verko. Verŝajne Reinhard Hauptenthal citos en Esperanto el la verko.

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, aŭ ĉe SEL (Libroservoj).

Homoj, nomoj, eventoj

La prezidanto de ILEI, rektoro Helmut Sonnabend, kaj la ĝenerala sekretario de ILEI, d-ro M. Dazzini, aŭtune 1978 vizitos la ĉefurbon de Madagaskaro, Tananarivo. La tiea instru-administracio petis pri helpo kaniagi en la aranĝo de Esperanto-klasoj. La du ILEI-estraranoj estos akceptitaj ankaŭ de la ĉefministro de Madagaskaro.

Jean Fethke, Berlin, - famkonata tra Esperantujo kiel verkisto laŭ sia pseŭdonimo Jean Forge - la 26-an de februaro festis sian 75-an naskiĝtagon.

La Nederlanda Esperanto-Kongreso okazos de la 6-a ĝis la 8-a de aprilo en la konferencoj apud Apeldoorn. Ĉeftemo estos: Eŭropa parlamento kaj la lingvoj. Renomaj esperantistoj kunlaboros. Informojn donas: Esperanto-Centro Nederlando, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

La ĉi-jara Konferenco de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI) okazos en la pola urbo Nowy Sacz de la 8-a ĝis la 15-a de aŭgusto.

S-ino Lubelsky-Bernard dum januaro 1978 prezentis sian tezon pri "La pacaj movadoj kaj ideologioj en Belgio ekde 1830 ĝis 1914" en la Fakultato de Sociaj, Politikaj kaj Ekonomiaj Sciencoj de la Brusela Libera Universitato. En tiu tezo, sur dek paĝoj, la aŭtorino klarigis ke de post ĝia estiĝo, Esperanto estis kunligita al pacaj tendencoj, tamen gravaj esperantistoj ne jam kreis pacajn movadojn. Por la esperantistoj, la intereso kuŝas en la bibliografiaj notoj. La aŭtorino permesis ĉiujn tradukaĵn aŭ franclingvajn publikigojn de sia teksto aŭ ekstraktojn. Oni sendu du ekzemplerojn de tiuj eventualaj publikigoj al Renaud G. de Saint Houlin (7, ave Henri Dietrich, B-1200 Bruxelles).

Aŭstria Esperantista Federacio povis festi la 40-an datrevenon de sia fondiĝo. La organizo estis fondita en la jaro 1937. Laŭ informo la Federacio ankaŭ en la nova jardeko daŭrigos sian laboron kiel tutlanda organizacio de la aliĝintaj fakaj, lokaj kaj kulturaj Esperanto-organizaĵoj en Aŭstrio.

"Wir lernen Esperanto" denove haveblas

Fine de ĉi tiu semajno denove haveblas la lernolibro "Wir lernen Esperanto" de Wingen, en fotorepreso de SEL. Prezo estas 9,80 GM. Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Nürnberg. Libroservoj mendu ĉe Sarlanda Esperanto-Ligo.

Nun denove estas haveblaj la kutimaj lerniloj por germanlingvanoj: Wir lernen Esperanto, Post la kurso (ambaŭ kun ŝlosilo) kaj la du vortaroj Deutsch-Esperanto de Wingen kaj Esperanto-Deutsch de Butin-Sommer.

Esperanto en Radio

Radio Roma. Post longa tempo denove estis aŭskultebla kaj sufiĉe komprenebla en Nürnberg Radio Roma. Tiu stacio i.a. disaŭdigis la felietonon "Energio el la Terkulturo" de Enzo Marino, en la traduko de Antonio De Salvo. Ĉi sekve ni publikigas tiun interesan artikolon:

"Jam ne estas utopio la produktado de energio el vivantaj organismoj, artefare imitante la proceson de lum-sintezo, por rekte krei likvajjn kaj gasajn brulaĵojn utiligante la sunenergion. La terkultura energio, nome la agrikulturo specife celantan la produktadon de energio, jam ekzistas en kelkaj laboratoriaj eksperimentoj, kvankam la rekta produktado de tiu energio estas ankoraŭ en esplora fazo. Antaŭ nelonge la nobel-premiito por kemio Calvin, direktoro de granda laboratorio en Kalifornio, deklaris, ke post maksimume kvar jaroj komencos funkcii la unua artefarita ĉelo, kiu imitos la proceson de lum-sintezo, kaj ke ĉirkaŭ je la fino de ĉi tiu jarcento la sistemo iĝos komerce ekspluatebla, kaj la sun-energio estos rekte transformata en hidrogenon. En unu jaro, la karbono naskiĝanta el la lum-sintezo konsistigas rimarkindan kvanton da energio, kiu egalas al 10-obla totala mondkonsumo de energio en 1970. Nur malgranda parto el ĉi tiu karbono (0,5 %) estas utiligata, post transformo, por nutri la kvar miliardojn da homoj, kiuj nuntempe vivas sur la Tero, kaj la bestojn. Pere de avangardaj agrikulturaj metodoj, oni povos plialtigi ĉi tiun procentaĵon ĝis 1 %. Tiel, se en estonteco oni sukcesos regi la proceson de lum-sintezo kaj ĝin gvidi laŭ la bezonoj, oni ne devos dissemi centojn da nukleaj reaktoroj. En 1975, rimarkigis profesoro Calvin, en Brazilo oni eltiris el sukerkano unu miliardon da litroj de alkoholo, kaj oni antaŭvidas, ke en baldaŭa estonteco la produktado ankoraŭ kreskos. Ĉi tiu alkoholo estas utiligata kiel brulaĵo por aŭtomobiloj. Aliaj studoj en la kampo de agrikultura energio celas la utiligon kiel brulaĵon, de la sekrecioj de kelkaj plantoj. Laŭ profesoro Calvin, estas realisme konsideri la biologiajn sistemojn, kiuj transformas energion, kiel potencialajn rimedojn por solvi la energi-problemojn de la homaro, ĉu kiel rektajn instrumentojn por la produktado de energio, ĉu kiel modelojn por la kreado de novtipaj transformiloj de energio."

La spaco fariĝis malgranda por pli detale trakti la aliajn staciojn, kiuj elsendas en Esperanto. Bone ni aŭdis la du lastajn elsendojn de Radio Zagreb. La lasta elsendo temis pri gastoj el Koreo. La venonta elsendo parolos "honore al la virinoj". - Tre bone aŭdebla kaj komprenebla nun estas Radio Vieno-ORF kun la semajna komentario de d-ro Macher. Pri la okdek-jariĝo de s-ro Rentmeister parolis artikolo de d-ro Beckmann. En la venonta elsendo oni aŭdis artikolon pri la broŝuro n-ro 4 d-ro Josef Hartl, Wien kun la titolo: Instigoj al nova monda ekonomiorĉo kaj efika evoluhelpo. Svisa Kurtonda Servo disaŭdigis artikolon de d-ro A. Baur pri gazetoj en romanĉa lingvo, tre interesan artikolon, kiu finis la serion pri la romanĉa lingvo. - Kiel ĉiam tre bone aŭdebla estis la elsendo de Vatikana Radio kun la liturgia semajna penso kaj informoj el la eklezia vivo. - Ĉiam bone ni aŭskultis la elsendojn de Radio Varsovio. La leterkesto anoncis, ke dum februaro la Esperanto-redakcio de Radio Varsovio ricevis pli ol 400 alskriboj. Dimanĉe vespere, je la 22,30 horo, oni aŭdis "La semajno en Pollando".